

# La Praevangelio laŭ Jakobo

El la Greka tradukita de Gerrit Isai Berveling

# *Enkonduke al La Praevangelio laŭ Jakobo*

Fakuloj atribuas ĉi tiun apokrifan evangelion, kiu precipe en la Ortodoksio estis (estas?) sufiĉe influa, al la dua duono de la dua jc. La influo estas ekzemple konstatebla el tio, ke oni faris bildojn pri detaloj el la historio, kaj sur Kreto en la urbeto Toplu mi eĉ foje trovis malnovan preĝejon, en kiu tuta serio da murpentraĵoj rakontas ĝin.

Tamen ankaŭ en okcidenta kristanismo ĝi havas siajn spurojn: Kiel infano en Nederlando mi posedis libreton, verkitan por infanoj, kiu baziĝas je tiu ĉi evangelio: Joahim kaj Anna kaj ilia infano Maria ktp.

Gerrit Isai Berveling

## *Fonto, el kiu estas tradukita:*

LOS EVANGELIOS APÓCRIFOS

Colección de textos griegos y latinos

versión crítica

estudios introductorios, comentarios e ilustraciones por Aurelio de Santos Otero

segunda edición

Madrid – MCMLXIII

## *Interrete:*

### *La originala Greka teksto:*

<http://www.myriobiblos.gr/bible/apocrypha/iakovos.asp>

### *La Greka per latinaj literoj kun Germana traduko:*

<http://12koerbe.de/euangeleion/iak.htm>

*Lastfoje kontrolitaj: 2020-05-02.*

# *La Praevangelio laŭ Jakobo*

## *Πρωτοευαγγέλιον τοῦ Ιακώβου*

**1** 1 En la historio de la dek du triboj de Izrael estis Joahim, ege riĉa, kiu faris siajn oferaĵojn duoble, dirante: La neŝuldata estu por la tuta popolo, la ŝuldata por la Sinjoro, ke Li estu pardonema al mi.

2 Venis la granda festo de l' Sinjoro, kaj la Izraelidoj alportis siajn oferaĵojn. Ruben stariĝis antaŭ Joahim kaj diris: Vi ne rajtas la unua alporti viajn donacojn, ĉar vi ne havas idon en Izrael.

Joahim ege tristiĝis, kaj foriris al la dekdutriba <libro / arkivo?<sup>1</sup>> de la popolo kun la vortoj: Mi konsultos la dekdutriban de Izrael, ĉu vere nur mi ne havas idon en Izrael. Kaj traserĉante, li trovis, ke ĉiuj justuloj postlasis idojn en Izrael. Li memoris, ekzemple, kiel patriarko Abraham en ekstrema aĝo ricevis de Dio sian filon Isaak.

4 Joahim ege tristiĝis, kaj ne plu montris sin al sia edzino. Li retiriĝis en la dezerton kaj tie ektendumis. Li fastis kvardek tagojn kaj kvardek noktojn kaj diris al si mem: Mi ne foriros al manĝo aŭ trinko antaŭ ol la Sinjoro mia Dio ekrigardos al mi; preĝo estos mia manĝo kaj trinko.

---

<sup>1</sup> La aŭtoro, ŝajne, ne havis ekzaktan komprenon pri multaj realaĵoj en la Juda vivo de tiu epoko.

**2** 1 Lia edzino Anna lamentis du lamentojn kaj dufoje frapis al si la bruston, dirante: Mi priploras mian vidvinecon, mi priploras mian senidecon.

2 Sed venis la granda festo de la Sinjoro kaj Judit, ŝia servistino, diris al ŝi: Ĝis kiam vi humiligos vin? Jen venis la granda festo de la Sinjoro kaj vi ne rajtas ĉagreni: prenu ĉi tiun kaptukon, kiun donis al mi la mastrino de l' laborejo, mi ja ne povas porti ĝin, ĉar mi estas nur servistino, dum ĝi estas de reĝa indeco.

3 Anna diris al ŝi: For de mi! Tion mi ne faras. La Sinjoro humiligis min sufiĉe. Kaj kiu scias, ĉu ne iu malbona donis ĝin al vi, kaj vi venas igi min kunkulpa al via peko.

Judit respondis: Kion mi sakru al vi, ĉar la Sinjoro jam fermis al vi la uteron, ke vi ne nasku idon en Izrael!

4 Anna ege tristiĝis. Ŝi demetis siajn funebrajn vestaĵojn, sin ŝminkis, surmetis la nuptovestaĵojn kaj ĉirkaŭ la naŭa horo iris en la ĝardenon por iom promeni. Ŝi vidis laŭron, eksidis sub ĝi kaj preĝis al la Sinjoro: Ho Dio de niaj patroj, benu min kaj aŭdu mian peton, kiel Vi aŭdis kaj benis la uteron de Sara kaj donis al ŝi Isaakon kiel filon.

**3** 1 Ŝi levis la okulojn ĉielen kaj vidis neston de paseroj en la laŭro. Kaj interne ŝi denove ĝemis dirante: Ve mi, kiu min generis! Kiu utero min naskis? Mi fariĝis malbena inter la idoj de Izrael kaj ili elsputis min el la templo de l' Sinjoro.

2 Ve mi, al kiu mi similas? Mi ne similas al la birdoj de la ĉielo, ĉar eĉ la birdoj de la ĉielo havas idojn antaŭ Vi, Sinjoro. Ve mi, al kiu mi similas? Mi ne similas al la sovaĝaj bestoj de la tero, ĉar eĉ la sovaĝaj bestoj de la tero havas idojn antaŭ Vi, Sinjoro.

3 Ve mi, al kiu mi similas? Mi ne similas al tiuj ĉi akvoj, ĉar eĉ la akvoj estas ĝeneraj antaŭ Vi, Sinjoro. Ve mi, al kiu mi similas? Mi ne similas al tiu ĉi grundo, ĉar eĉ tiu ĉi grundo produktas siajn fruktojn ĝustatempe kaj laŭdas Vin, Sinjoro.



**4** 1 Jen tiam aperis al ŝi anĝelo de la Sinjoro kaj diris al ŝi: Anna, Anna, la Sinjoro aŭdis vian peton. Vi koncipos kaj naskos. Kaj via ido menciigos en la tuta mondo. Anna diris: Vivas la Sinjoro mia Dio! Se infanon mi naskos ĉu viran ĉu inan, tiun mi alportos kiel donacon al la Sinjoro mia Dio: tiu servos Lin, ĉiujn tagojn de sia vivo.

2 Jen venis du anĝeloj kaj diris al ŝi: Joaĥim via edzo alvenas kun sia grego. Ĉar anĝelo de la Sinjoro iris diri al li: Joaĥim, Joaĥim, la Sinjoro Dio aŭdis viajn preĝojn. Reiru de ĉi tie: ĉar via edzino Anna estas graveda.

3 Reiris Joaĥim. Li ordonis al siaj paŝtistoj: Prenu tiujn ĉi dek ŝafidojn senmankajn – tiuj estos por la Sinjoro mia Dio. Kaj prenu dek du junajn bovidojn – tiuj estos por la pastroj kaj la sinedrio. Kaj cent junajn bokojn por la tuta popolo.

4 Joaĥim iris kun siaj paŝtistoj kaj Anna staris ĉe la pordo kaj vidis Joaĥimon alveni. Ŝi kuris al li, brakumis lian kolon kaj diris: Nun mi scias, ke la Sinjoro Dio benis min ege, ĉar jen la sterila ne plu estas sterila, kaj mi la seninfana estos graveda. Kaj tiun unuan tagon Joaĥim pasigis en sia hejmo.

**5** 1 La morgaŭon li portis siajn oferaĵojn, dum li diris ĉe si mem: Se la Sinjoro Dio vere kompatas min, la efodo<sup>2</sup> de la pastro tion montros al mi. Kaj Joaĥim oferis siajn donacojn kaj rigardis la efodon de la pastro, dum tiu staris ĉe la altaro de l' Sinjoro, kaj li ne vidis pekon en ĝi. Joaĥim diris: Nun la Sinjoro kompatas min kaj pardonis ĉiujn miajn pekojn. Kaj li foriris el la templo de la Sinjoro, justigite. Kaj li venis hejmen.

2 Ŝiaj monatoj pleniĝis; en la naŭa monato Anna naskis. Ŝi diris al la akuŝistino: Kion mi naskis? Ŝi diris: Inon. Anna diris: Grandiĝis hodiaŭ mia animo. Kaj ŝi metis ŝin en la lulilon. Kaj kiam pasis la tagoj <laŭ la

---

<sup>2</sup> La efodo de la pastro. Vidu Eliro 25:7; 28:6-14. Tie ĉi ĝi funkcias kvazaŭ orakolilo.

Leĝo>, Anna sin purigis, kaj donis la mamon<sup>3</sup> al la bebo, kaj nomis ŝin Maria.

**6** 1 Tagon post tago la infano fariĝis pli fortika. Kaj kiam sesmonata ŝi fariĝis, la patrino metis ŝin surplanken por vidi, ĉu ŝi povas stari. Ŝi faris sep paŝojn kaj tiam iris al ŝia sino. Ŝi ekkaptis ŝin kaj diris: Vivas la Sinjoro mia Dio! Ne plu paŝu sur tiu ĉi grundo, antaŭ ol mi kondukos vin al la Templo de la Sinjoro. Kaj ŝi faris sanktejon en ŝia dormoĉambro, kaj nenion vulgaran aŭ malpuran ŝi allasis al ĝi. Ŝi vokis junajn filinojn de la Hebreoj, nur virgulinojn, kiuj amuzis ŝin.

2 Estis la unua naskiĝdatreveno de l' etulino. Joaĥim faris grandan akcepton kaj invitis la pastrojn, la skribistojn, la pliaĝulojn kaj tutan la popolon de Izrael. Kaj Joaĥim kondukis la knabinon al la pastroj kaj ili ŝin benis per la vortoj<sup>4</sup>: Ho Dio de niaj patroj, benu tiun ĉi knabinon kaj donu al ŝi nomon gloran en ĉiuj generacioj. Kaj la tuta popolo diris: Estu! Amen! Fariĝu! Kaj li kondukis ŝin al la ĉefpastroj, kaj ili ŝin benis per la vortoj: Ho Dio Plejalta, ekrigardu sur tiun ĉi knabinon kaj benu ŝin treege, kiel estos nesupereble.

3 Ŝia patrino prenis ŝin kun si al la sanktejo de l' dormoĉambro kaj donis al si la mamon. Kaj Anna faris himnon por la Sinjoro Dio: Mi kantas por la Sinjoro mia Dio, ĉar Li ekrigardis min kaj forigis de mi la malŝaton de miaj kontraŭuloj. La Sinjoro donis al mi frukton de sia justeco: unikan kaj multoblan en liaj okuloj. Kiu anoncos al la filoj de Ruben, ke Anna mamnutras? Aŭskultu, aŭskultu, ho vi dek du triboj de Izrael: Anna mamnutras!

Kaj ŝi ripozigis ŝin en la dormoĉambra sanktejo; ŝi iris eksteren, kaj priservadis ilin. Kaj finiĝis la manĝo; ili foriris ĝojaj kaj laŭdis la Dion de Izrael.

---

<sup>3</sup> Ŝajnas, kvazaŭ la bebo Maria la unuajn tagojn do tute ne ricevis nutradon.

<sup>4</sup> Plej neverŝajne: la (Judaj!) pastroj benas Marian kvazaŭ estante plej piaj Maria-adorantoj!

**7** 1 Intertempe por la knabino plinombriĝis la monatoj. Ŝi fariĝis dujara kaj Joahim diris al Anna: Ni konduku ŝin al la templo de la Sinjoro, por plenumi la promeson kiun ni faris, por ke la Sinjoro ne sendu al ni iun por akcepti de ni nian donacon. Anna diris: Ni atendu la trian jaron, por ke la knabino ne havu hejmsopiron al patro aŭ patrino. Joahim diris: Amen. Tiel estu.

2 Trijara fariĝis la infano kaj Joahim diris: Ni voku la filinojn de la Hebreoj, la virgulinojn, kaj ili prenu torĉojn; ili bruligu tiujn kaj stariĝu, por ke la knabino ne sin returnu kaj ke ŝia koro ne estu kaperita el la templo de la Sinjoro. Kaj tiel ili faris ĝis ili atingis la templon de la Sinjoro. La pastro ŝin akceptis, kisis ŝin kaj benis kaj diris: La Sinjoro grandigis vian nomon en ĉiuj generacioj, ĉar je la fino de la tempoj la Sinjoro montros en vi sian savon al la Izraelidoj.

3 Ili metis ŝin sur la trian ŝtupon de la brul-altaro. Kaj la Sinjoro Dio metis gracon sur ŝin, kaj ŝi dancis per siaj piedetoj, kaj la tuta domo de Izrael amis ŝin.

**8** 1 Ŝiaj gepatroj foriris mirigitaj kaj laŭdis la potencon Dion, ĉar la infano ne reiris al ili. Maria restis en la templo de la Sinjoro kiel prizorgantino de la kolomboj, kaj manĝaĵojn ŝi ricevis el la manoj de anĝelo.

2 Kiam ŝi fariĝis dekdujara, okazis kunveno de la pastroj; ili diris: Maria fariĝis dekdujara en la templo de la Sinjoro. Kion do ni faru nun pri ŝi, por ke ŝi ne malpurigu la sanktejon de l' Sinjoro? Ili diris al la ĉefpastro: Vi zorgas pri la brul-altaro; eniru kaj preĝu pri ŝi kaj kion la Sinjoro montros al vi, tion ni do faru.

3 La ĉefpastro eniris kaj portis la mantelon kun la dek du tintiloj en la plejsanktejo. Li preĝis pri ŝi. Kaj jen anĝelo de la Sinjoro aperis al li kaj diris: Zahario, Zahario, vi eliru kaj kunvoku ĉiujn aĝulojn de la popolo, kaj ĉiu kunportu sian bastonon, kaj ĉe kiu la Sinjoro montros signon, ties edzino ŝi estos. Diriris do la heroldoj tra la tuta ĉirkaŭaĵo de Judajo kaj eĥis la trumpeto de l' Sinjoro kaj ĉiuj alkuris.



**9** 1 Jozef flankenmetis sian hakilon kaj eliris por renkonti ilin. Kune ili iris al la ĉefpastro, ĉiuj kun sia bastono. Li prenis ĉies bastonojn kaj eniris la templon kaj preĝis. Kiam li finis la preĝon, li prenis la bastonojn kaj eksteren iris kaj redonis ilin al ili. Sed ĉe neniuj videblis iu signo. Fine li prenis la bastonon de Jozef, kaj jen: kolombo eliĝis el la bastono kaj flugis al la kapo de Jozef. La pastro diris al Jozef: Vi estas elektita por preni la virgulinon de l' Sinjoro sub via zorgo.

2 Jozef respondis: Mi havas filojn kaj jam estas maljuna, sed ŝi estas juna. Se la Izraelidoj ja ne primokos min! La pastro diris al Jozefo: Vi timu la Sinjoron vian Dion! Memoru, kion Li faris al Datan, Abiron kaj Kore<sup>5</sup>, kiel disiĝis la tero kaj ili englutiĝis pro sia ribelado. Jozef, ankaŭ vi timu, por ke tio ne same okazu al via domo.

3 Plena je timo, Jozef ricevis ŝin ĉe si por gardi ŝin. Kaj Jozef diris al Maria: Nun mi ricevis vin el la templo de la Sinjoro, kaj mi vin akceptas en mian hejmon. Mi foriros plenumi miajn konstrulaborojn<sup>6</sup>. Poste mi revenos al vi. La Sinjoro vin gardos.

**10** 1 Okazis kunveno de la pastroj, kiuj diris: Ni farigu antaŭtukegon por la templo de la Sinjoro. La pastro diris: Voku la senmakulajn virgulinon el la tribo de David<sup>7</sup>. La servistoj foriris kaj serĉadis, kaj ili trovis sep virgulinon. La pastro ekmemoris pri la knabino Maria, ke ankaŭ ŝi estas el la tribo de David, kaj senmakula antaŭ Dio. La servistoj foriris kaj venigis ŝin.

2 Ili enkondukis ilin en la templon de la Sinjoro. La pastro diris: Lotumu, kiu brodos la oron, la amianton, la linon, la silkon, la bluan lanon, la skarlaton kaj la veran purpuron. Kaj Marian trafis la vera purpuro kaj la skarlatato. Ŝi akceptis ĝin kaj foriris hejmen. En tiu tempo Zahario estis

---

<sup>5</sup> Datan k. c. – vidu Nombroj 16.

<sup>6</sup> Jozef ŝajne estas konstruentreprenisto.

<sup>7</sup> Tribo de David ne ekzistas.

muta<sup>8</sup>, kaj anstataŭis lin Samuel ĝis kiam Zahario ree parolis. Maria akceptis la skarlaton kaj ekŝpinis.

**11** 1<sup>9</sup> Ŝi prenis la ujon kaj iris eksteren por plenigi ĝin per akvo. Tiam voĉo diris: Saluton, gracoplena<sup>10</sup>, la Sinjoro estas kun vi, benata vi estas inter la virinoj. Kaj ŝi ĉirkaŭrigardis dekstren kaj maldekstren, de kie do venas tiu voĉo. Kaj ŝi tre timis kaj reiris hejmen kaj formetis la kruĉon. Ŝi prenis la purpuron, eksidis sur trono<sup>11</sup> kaj ekŝpinis.

2 Kaj jen anĝelo de la Sinjoro ekstaris antaŭ ŝi kaj diris: Ne timu, Maria. Vi ja trovos gracon ĉe la Mastro de ĉio, kaj vi koncipos de lia Parolo. Kiam tion ĉi ŝi aŭdis, ŝi diris en si mem: Ĉu mi koncipos de la Vivanta Dio, kaj naskos kiel naskas ĉiu virino?

3 Diris la anĝelo de la Sinjoro: Ne tiel, Maria: ĉar la forto de la Sinjoro superombros vin. Tial kio sankta naskiĝos el vi, nomiĝos filo de la Plejalta. Kaj vi nomos lin Jesuo. Li ja savos sian popolon de ĝiaj pekoj. Kaj diris Maria: Jen mi estas la servistino de la Sinjoro. Fariĝu al mi laŭ via vorto.

**12** 1 Ŝi finis <la taskon pri> la purpuro kaj la skarlato, kaj portis ĝin al la pastro. La pastro benis ŝin kaj diris: Maria, la Sinjoro Dio grandigis vian nomon, kaj vi estos benata inter ĉiuj generacioj de la tero.

2 Plenigite de graco Maria foriris al sia parencino Elisabet. Ŝi vokis ŝin al la pordo. Kiam Elisabet tion aŭdis, ŝi faligis la skarlaton, kuris al la pordo kaj malfermis ĝin. Kaj vidante Marian, ŝi ŝin benis kaj diris: De kie tia honoro, ke la patrino de mia Sinjoro venas al mi? Ĉar la bebo en mi eksaltis kaj benis vin. Sed Maria forgesis la misterojn, kiujn sciigis al ŝi

---

<sup>8</sup> Zahario muta. Vidu Luko 1:20.

<sup>9</sup> En la sekva sceno estas multaj citoj / duoncitoj el Marko 1.

<sup>10</sup> Luko 1:28.

<sup>11</sup> Trono: Maria estas de Davida (reĝa) deveno!

Gabriel la ĉefanĝelo, kaj levis la okulojn ĉielen kaj diris: Kiu estas mi, Sinjoro, ke ĉiuj generacioj benu min?

3 Kaj ŝi pasigis tri monatojn ĉe Elisabet. De tag' al tago ŝia ventro pli dikiĝis. Plena je timo Maria foriris hejmen kaj kaŝis sin antaŭ la Izraelidoj. Ŝi estis dekŝes-jara, kiam ĉi tiuj misteroj okazis.

**13** 1 Fariĝis al ŝi la sesa monato, kaj jen revenis Jozef de sia konstrulaboro; kiam la domon li eniris, li trovis ŝin dikventra. Li frapis al si la frunton, sin terenĵetis sur sakon, kaj amare ploris kun la vortoj: Kun kia vizaĝo mi aperos antaŭ la Sinjoro mia Dio? Kaj kion mi preĝos por tiu ĉi knabino? Ĉar mi ricevis ŝin el la templo de la Sinjoro mia Dio, kaj ne gardis ŝin. Kiu postĉasis min? Kiu faris ĉi honton en mia domo kaj malpurigis la virgulinon? Ja ne ripetiĝas ĉe mi la historio de Adam?! Ĉar ĝuste je la momento, kiam li estis laŭdanta Dion, venis la serpento kaj trovis Evan sola kaj forlogis ŝin; tiel same okazis al mi.

2<sup>12</sup> Jozef leviĝis de la sako, vokis Marian kaj diris al ŝi: Plejamata de Dio, kial tion vi faris? Ĉu vi forgesis la Sinjoron vian Dion? Kiel vi malhonoris vian animon, vi kiu edukiĝis en la plejsanktejo kaj ricevis nutraĵojn el la mano de anĝelo?

3 Sed ŝi ploris amare, dirante: Pura mi estas kaj viron mi ne ekkonis. Jozef diris al ŝi: De kie do estas tio en via utero? Kaj ŝi diris: Vivas la Sinjoro Dio<sup>13</sup>: mi ne scias, de kie ĝi estas en mi.

**14** 1 Jozef ege ektimis, kaj retiriĝis de ŝi. Li pripensadis, kion fari pri ŝi. Li diris en si mem: Se ŝian kulpon mi kaŝos, mi klare kontraŭos la Leĝon de la Sinjoro. Sed se mi malkaŝos ŝin al la Izraelidoj, mi timas, ke tio en ŝi eble estos anĝeleska. Tiam mi montriĝos perfidulo kontraŭ sango senkulpa. Kion mi do faru kun ŝi? Kaŝe mi do forsendos ŝin de mi. Kaj tiumomente kaptis lin la nokto.

---

<sup>12</sup> Ĉe tio oni komparu kun Mateo 1:19-25.

<sup>13</sup> Speco de ĵurformulo.



2 Jen anĝelo de la Sinjoro aperis al li en sonĝo kaj diris: Ne timu tiun knabinon. Tio en ŝi estas el sankta spirito. Ŝi naskos filon kaj vi nomos lin Jesuo; ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pekoj. Jozef leviĝis el sia dormo kaj laŭdis la Dion de Izrael, kiu donis al li tiun gracon. Kaj li gardis ĉe si Marian.

**15** 1 Venis Annas la skribisto al li kaj diris al li: Kial vi ne aperas en la sinodo<sup>14</sup>? Jozef diris al li: Mi estis laca pro la vojaĝo, kaj la unuan tagon mi ripozis. Mi revenis kaj trovis Marian dikventra.

2 Li kure foriris al la pastro kaj diris al tiu: Jozef, pri kiu vi respondecas, faris gravan krimon. Kaj diris la pastro: Kion do? Li diris: La virgulinon, kiun li ricevis el la templo de la Sinjoro – tiun li malpurigis, kaj tiel li ŝtelis de ŝi la nupton<sup>15</sup>, sen klare montri ĝin al la Izraelidoj. La pastro respondis: Ĉu Jozef tion faris? Kaj Annas la skribisto diris: Vi sendu servistojn, kaj vi trovos ke la virgulino estas dikventra. Foriris la servistoj kaj trovis, kion li diris, kaj ili forkondukis ŝin kune kun Jozef al la juĝejo.

3 La pastro diris: Maria, kial vi faris tion? Kial vi malhonoris vian animon kaj forĝesis la Sinjoron vian Dion? vi kiu edukiĝis en la plejsanktejo kaj ricevis nutraĵojn el la mano de anĝelo kaj aŭskultadis la himnojn kaj dancis antaŭ Dio?! Kial tion vi faris? Sed ŝi ploris amare kaj diris: Vivas mia Dio: pura mi estas antaŭ Li kaj viron mi ne ekkonis.

4 La pastro diris al Jozef: Kial vi faris tion? Jozef diris: Vivas mia Dio: pura mi estas de ŝi. La pastro diris: Ne false atestu, sed parolu la veron. Vi ŝtelis ŝian nupton kaj ne klare montris tion al la Izraelidoj. Vi ne kurbigis vian nukon sub la potenca mano <de Dio><sup>16</sup>, por ke estu benata via idaro. Kaj Jozef silentis.

---

<sup>14</sup> Sinodo – tipe kristana nocio.

<sup>15</sup> La eblon de nupto; se knabino ne plu estis virgulino, kutime neniu viro plu volis preni ŝin kiel edzinon.

<sup>16</sup> Submetiĝi al la volo de Dio – oni celas nuptoceremonion.



**16** 1 La pastro diris: Redonu la virgulinon, kiun vi ricevis el la templo de la Sinjoro. Jozef ege ekploris. La pastro diris: Mi igos vin trinki la akvon de l' testado de la Sinjoro<sup>17</sup>, kaj ĝi montros viajn pekojn antaŭ viaj okuloj.

2 La pastro ĝin prenis kaj trinkigis Jozefon. Li sendis lin en la dezerton; sed li revenis sendamaĝa. Li ankaŭ trinkigis Marian, sendis ŝin en la dezerton, sed ankaŭ ŝi revenis sendamaĝa. Kaj miris la tuta popolo, ke ĉe ili neniu peko montriĝis.

3 La pastro diris: Se la Sinjoro ne montris viajn pekojn, ankaŭ mi ne juĝos vin. Kaj li liberigis ilin. Jozef prenis Marian kaj reiris hejmen, ĝoja kaj laŭdante la Dion de Izrael.

**17** 1<sup>18</sup> Ordonon venis de reĝo Aŭgusto registri ĉiujn en Betlehem de Judajo<sup>19</sup>. Jozef diris: Mi registrigos miajn filojn, sed kion mi faru pri tiu ĉi knabino? Kiel mi registru ŝin? Kiel mian edzinon? Mi hontas. Sed ... kiel filinon? Sed ĉiuj Izraelidoj scias ja, ke ŝi ne estas mia filino. Tio ĉi estas la tago de la Sinjoro, kiu montros, kiel ĝin volas la Sinjoro.

2 Kaj li selis la azeninon kaj sidigis <Marian> sur ĝi. La filo ĝin kondukis kaj Jozef sekvis. Kiam ili distancis tri mejlojn, Jozef sin returnis kaj vidis ŝin trista. Li diris al si mem: Eble tio en ŝi suferigas ŝin. Sed kiam denove li sin turnis, Jozef vidis ke ŝi ridas. Li diris al ŝi: Maria, kio estas tio, ke kelkfoje mi vidas vian vizaĝon rida, kelkfoje trista? Kaj Maria diris al Jozef: Ke du popolojn<sup>20</sup> mi vidas antaŭ miaj okuloj: unu kiu ploras kaj veas, kaj unu kiu ĝojas kaj gajas.

3 Kiam ili atingis duonvojon, Maria diris al li: Malsuprenigu min de l' azenino, ĉar tio en mi urĝas por naskiĝi. Li malsuprenigis ŝin de la

---

<sup>17</sup> Vidu Nombroj 5:18-27.

<sup>18</sup> Por la sekvo oni vidu ĉe Luko 2.

<sup>19</sup> Ĉu nur en Betlehem okazis la registriĝo?

<sup>20</sup> Ĉu la aŭtoro celas la Judojn kaj la Kristanojn?

azenino kaj diris al ŝi: Kien mi konduku vin por ŝirmi vian pudoron? Ĉar ĉi loko estas dezerta.

**18** 1 Li trovis groton tie, kaj kondukis ŝin en ĝin, kaj li lasis siajn filojn ĉe ŝi, kaj mem iris eksteren por serĉi en la regiono de Betlehem Hebrean akuŝistaron.

2 Mi<sup>21</sup>, Jozef, ĉirkaŭiris kaj ne ĉirkaŭiris, kaj mi ekrigardis al la ĉielo kaj mi vidis, ke la poluso de l' ĉielo senmovas, kaj ke la birdoj de la ĉielo timskuiĝis, kaj jen mi ekrigardis la teron kaj vidis ujon sur la grundo kaj laboristojn, kiuj alkuŝiĝis<sup>22</sup>, kaj iliaj manoj jam estis en la ujo, sed kiam ili retiris <la manojn>, ili entenis nenion, kaj kiam ili portis <ilin> al la buŝo, nenion ili alportis, sed la vizaĝo de ili ĉiuj estis supren rigardanta, kaj mi vidis ŝafojn paŝe pelataj, kaj la ŝafoj restis senmovaj kaj la paŝtisto levis <la manon> por bastoni ilin, sed lia mano restis suprenlevita, senmove, kaj mi direktis la rigardon laŭ la fluo de la rivero kaj vidis boketojn, kiuj metis la buŝon en la akvon, sed ili ne trinkis. Unuvorte: ĉio estis eksterorde<sup>23</sup>.

**19** 1 Tiam jen descendis virino de la montaro kaj diris al mi: Homo, kien vi iras? Kaj mi diris: Mi serĉas Hebrean akuŝistaron. Ŝi respondis al mi: Ĉu vi estas el Izrael? Mi diris al ŝi: Jes. Ŝi diris: Kaj kiu estas, kiu naskos en tiu groto? Mi diris: Mia fianĉino. Ŝi diris al mi: Ĉu ŝi ne estas via edzino? Kaj mi diris al ŝi: Estas Maria, kiu edukiĝis en la templo de la Sinjoro, kaj per loto mi ricevis ŝin kiel edzinon, sed ŝi ne jam estas mia edzino, sed ŝi koncipis el sankta Spirito. La akuŝistino diris al mi: Ĉu tio estas vero? Diris al ŝi Jozef: Venu rigardi. Kaj la akuŝistino foriris kun li.

2 Kiam ili atingis la lokon de la groto, nubo lumoza superombris la groton. La akuŝistino diris: Hodiaŭ grandiĝas mia animo, ĉar miaj okuloj vidis mirindaĵojn, ĉar naskiĝis la savo de Izrael. Kaj tuj foriĝis la nubo de

---

<sup>21</sup> Subite ŝanĝiĝo al «Mi ...».

<sup>22</sup> Tiutempe oni ofte manĝis kuŝante.

<sup>23</sup> La naskiĝo de Jesuo kiel filo de Dio estas tia miraklo, ke pormomente ĉio haltas.

la groto kaj aperis en la groto ega lumo, tiel ke niaj okuloj ĝin ne eltenis. Kaj post mallonge tiu lumo foriĝis, ĝis aperis la infano, kiu iris preni la mamon de sia patrino Maria. La akuŝistino ekkriis: Granda estas por mi la hodiaŭa tago, ĉar tiun ĉi tut-novan spektaklon mi vidis.

3 La akuŝistino eliris el la groto kaj renkontis Saloman. Ŝi diris al ŝi: Saloma, Saloma, mi havas tut-novan spektaklon por raporti al vi. Virgulino naskis kaj ŝia naturo ne difektiĝis. Saloma diris: Vivas mia Dio: se mi ne metos mian fingron<sup>24</sup> por kontroli ŝian naturon, mi ne kredos, ke naskis virgulino.

**20** 1 Eniris la akuŝistino kaj diris al Maria: Prenu pozon; ĉar ne malgranda estas la konflikto inter ni. Kaj Saloma metis sian fingron sur ŝian naturon kaj ekkriĉis kaj diris: Ve al mia stulteco kaj senfido, ĉar mi elprovis la Vivan Dion: jen mia brako brulas en flamoj!

2 Ŝi fleksis la genuojn antaŭ la Sinjoro kaj diris: Dio de miaj patroj, memoru pri mi, ĉar mi estas ido de Abraham kaj Isaak kaj Jakob. Ne elmetu min al publika malhonoro ĉe la Izraelidoj, sed resanigu min denove! Vi ja scias, Mastro, ke en via nomo mi plenumis miajn servojn, ricevante de Vi mian pagon.

3 Jen anĝelo de la Sinjoro ekstaris kaj diris al ŝi: Saloma, Saloma, la Sinjoro aŭskultis vin. Iru al la infano, tuŝu lin kaj vi spertos grandan saviĝon.

4 Saloma alproksimiĝis kaj tuŝis lin, kun la vortoj: Mi adoros lin, ĉar naskiĝis granda reĝo por Izrael. Kaj tuj Saloma saniĝis, kaj ŝi forlasis la groton justigita. Kaj sonis voĉo: Saloma, Saloma, ne sciigu la mirindaĵojn, kiujn vi vidis, antaŭ ol la knabo eniros en Jerusalemon.

---

<sup>24</sup> Vidu Johano 20:25.



**21** 1 Jozef sin pretigis por eliri al Judajo. Fariĝis granda tumulto en Betlehem de Judajo, ĉar venis magoj<sup>25</sup>, kiuj diris: Kie estas la naskita reĝo de la Judoj? Ĉar ni vidis lian stelon en la oriento kaj venis por adori lin.

2 Kiam Herodo tion aŭdis, li ektimis, kaj sendis servistojn al la magoj. Li invitis la ĉefpastrojn kaj pridemandis ilin: Kiel estas skribite pri la Mesio, kie li naskiĝos? Kaj ili diris al li: En Betlehem de Judajo; tiel ja estas skribite. Li forpermesis ilin. Li pridemandis la magojn per la vortoj: Kian signon vi vidis pri la naskita reĝo? Kaj la magoj diris: Ni vidis grandegan stelon, kiu brilis inter la ceteraj steloj kaj eklipsis ilin, tiel ke la steloj ne plu estis videblaj. Tiel ni do komprenis, ke naskiĝis reĝo por Izrael, kaj ni venis adori lin. Herodo diris: Iru kaj serĉu lin. Kaj kiam vi trovos lin, informu min, por ke ankaŭ mi iru adori lin.

3 La magoj foriris. Kaj jen la stelo, kiun ili vidis en la oriento, gvidis ilin ĝis ili atingis la groton kaj ekhaltis super la enirejo de la groto<sup>26</sup>. Kaj la magoj vidis la knabeton kun lia patrino Maria, kaj prenis el siaj sakoj donacojn: oron kaj incenson kaj mirhon.

4 Kaj avertite de anĝelo ne eniri Judajon, ili revojaĝis hejmen laŭ alia vojo.

**22** 1 Kiam Herodo komprenis, ke la magoj lin trompis, li sendis, kolerega, murdistojn kun la ordono: La bebojn de du jaroj kaj malpli vi mortigu.

2 Kiam Maria aŭdis, ke oni mortigas la infanetojn, timplene ŝi ekprenis la knabeton, envolvis lin en tukojn kaj metis lin en manĝotrogon de bovoj.

3 Kiam Elisabet aŭdis, ke oni serĉas Johanon, ŝi prenis lin kaj foriris en la montaron, kaj ĉirkaŭrigardis, kie kaŝi lin. Sed ne estis kaŝejo. Elisabet laŭte lamentadis: Monto de Dio, akceptu patrinon kun infano! Ĉar Elisabet ne povis plu iri. Kaj tuj disdugiĝis la monto kaj akceptis ŝin. Kaj la

---

<sup>25</sup> Interplektiĝas la rakonto de Mateo 2.

<sup>26</sup> En Mateo ili trovas lin tamen en domo.



monto estis por ŝi klarluma. Ĉar anĝelo de la Sinjoro estis kun ili, por gardi ilin.

**23** 1 Herodo plu serĉis Johanon kaj sendis servistojn al Zaĥario kun la vortoj: Kie vi kaŝis vian filon? Li respondis al ili: Mi estas servanto de Dio kaj kutime troviĝas en la templo de la Sinjoro. Mi ne scias, kie estas mia filo.

2 La servistoj reiris kaj informis al Herodo ĉion ĉi. Kolerega Herodo diris: Lia filo devas reĝi pri Izrael. Kaj denove li sendis al li kun la vortoj: Diru la veron! Kie estas via filo? Vi ja scias, ke via sango dependas de mia mano. Kaj la servistoj iris kaj sciigis ĉion ĉi al li.

3 Zaĥario diris: Mi estos martiro de Dio, se mian sangon vi elverŝos. Ĉar la Mastro ricevos mian spiriton, ĉar vi elverŝos senkulpan sangon en la vestiblo de la templo de la Sinjoro. Kaj je ektagiĝo Zaĥario estis murdita. Sed la Izraelidoj ne sciis, ke li estis murdita.

**24** 1 Venis la pastroj je la horo de la preĝo, sed la beno de Zaĥario ne eĥe respondis al ili, laŭ la kutimo. Staris la pastroj tie, atendante Zaĥarion, por saluti lin en la preĝado kaj por glori la Plejaltan.

2 Kiam fariĝis tarde, ĉiuj ektimis. Kaj unu el ili ekkuraĝis eniri kaj vidis apud la brul-altaro koaguliĝintan sangon kaj aŭdis voĉon, kiu diris: Zaĥario estis murdita, kaj lia sango ne estos viŝita antaŭ ol venos lia venĝanto. Kiam tion li aŭdis, li ektimis, kaj iris eksteren kaj sciigis ĝin al la pastroj.

3 Ili ekkuraĝis eniri kaj vidis la okazintaĵojn, kaj ili vekriis kontraŭ la plafonon kaj ili disŝiris siajn vestaĵojn desupre suben. Lian korpon ili ne trovis, sed ili trovis lian sangon ŝtoniĝinta. Timplenaj ili iris eksteren kaj mesaĝis al la tuta popolo, ke Zaĥario estas murdita. Ĉiuj triboj de la popolo tion aŭdis, ili priploris lin kaj lamentis tri tagojn kaj tri noktojn.

4 Post la tri tagoj la pastroj kunvenis pri tio, kiun ili elektu anstataŭ li; la sorto indikis Simeonon<sup>27</sup>. Ĉar al li la Sankta Spirito sciigis, ke li ne vidos la morton antaŭ ol li vidos la Mesion en persono.

**25** 1 Mi, Jakobo, kiu skribis ĉi tiun historion, kiam en Jerusalemo fariĝis granda tumulto, kiam mortis Herodo, retiriĝis en la dezerto, ĝis ĉesiĝos la tumulto en Jerusalemo, dum mi laŭdis la Mastron Dio, kiu donacis al mi la gracon kaj la saĝon por verki ĉi tiun historion.

2 La graco estu kun ĉiuj, kiuj timas antaŭ nia Sinjoro Jesuo Mesio, al kiu estu la gloro en la jarcentoj de la jarcentoj. Amen.

---

---

<sup>27</sup> Luko 2:25.